Bernd Hasecke,

# En okcidento nun ruĝe

En okcidento nun ruĝe
Arda subiras la sun',
Baldaŭ leviĝos senmuĝe
Pala en brilo la lun'.

Kantis la birdoj laŭ sperto
Dum la somera lum-fest',
Dormas nun post la koncerto
Jam en kaŝita la nest'.

En la vesperaj aeroj
Ĉiu silentas viv-son',
Pri plenumotajj esperoj
Songâs la roza burĝon'.

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Bernd Hasecke *(∗1928-12.29 – †2008-02-05).*

*Arg-1004-2030 (2014-05-05 11:37:33)*

*La poemo estas kantebla laŭ la melodio de la kanto "Seht, wie die Sonne dort sinket.. ". La teksto de tiu ĉi kanto legeblas en* `http://www.volksliederarchiv.de/text2814.html`. *La melodio estas aŭdebla en* `http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/susserdi.html` *kaj en* `http://www.youtube.com/watch?v=brapUYB5n20`. *La muzik-notoj legeblas en* `http://www.hymnary.org/text/seht_wie_die_sonne_dort_sinket`.